Johann Wolfgang von Goethe,

## Из Гёте

*tradukita de Михаил Лермонтов*

Горные вершины
Спят во тьме ночной;
Тихие долины -
Полны свежей мглой;
Не пылит дорога,
Не дрожат листы ...
Подожди немного,
Отдохнешь и ты.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)

Über allen Gipfeln
Ist Ruh,
In allen Wipfeln
Spürest du
Kaum einen Hauch;
Die Vögelein schweigen im Walde.
Warte nur, balde
Ruhest du auch.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —
silent',
tra pinopingloj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

...

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de Johann Wolfgang von Goethe (∗1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de Михаил Лермонтов (∗1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm. Vidu ankaŭ la retejon http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/MiДжail_Lermontov. La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de Johann Wolfgang von Goethe (∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Johann Wolfgang von Goethe (∗1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (Gickelhahn) bei Ilmenau (Thüringen), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (Germanio). Tie li skribis la versojn per krajono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (rimarkigo de l’ eldoninto)

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de Johann Wolfgang von Goethe (∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Richard Schulz (Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de Johann Wolfgang von Goethe (∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Pejno Simono (Simon Edward Adrian Payne, ∗1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe.